



# SPORTAKTO

numero 154 (1996:4)

## OLIMPIAJ LUDOJ

*...ne nur  
sporto*





Pri donacoj kaj agacoj	Jia Tian, Aŭstralio (el UNESCO Courier)	2
Olimpiaj Ludoj – ne nur sporto	Kjell Heggvald Ullestad, Norvegio	4
La ĵetbuloj	Atiljo Orellana Rojas, Argentino	8
Prelegvojaĝo	Anna Löwenstein, Italio	8
Ĝŝhó-Davies Olúwábùnmí	Redakcio	8
Trovita Trojo	Irina Aleksejeva, Rusio	10
Reĝa dormo	A. Hakimnejad, Irano	10
Du rakontoj pri koko	Reinhard Pflüger, Germanio	11
Lernejaĝo de vilaĝano	Gbeglo Koffi, Togolando	12
La pluŝa kato	Cristina de' Giorgi, Italio	13
La alia decido	Lázaro Azcuy, Kubo	14
Tentaklo		14
La perfidema meduzo	Robert Roze, Francio	15
Forto	S. Ralf Gion Fröhlich, Svedio	16

## KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 154 (1996:4), 33-a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;

☎ +31 10 436 10 44

✉ +31 10 436 17 51

☐ uea@inter.nl.net

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Irina Aleksejeva (Rusio)

Abel Machado dos Anjos (Brazilo)

Felip Artero i Lozano (Katalunio)

Zoran Ćirić (Serbio)

Alberto Garcia Fumero (Kubo)

Gbeglo Koffi (Togolando)

Bernard Golden (Hungario)

Claus Günkel (Germanio)

Kizeyidioko Mayinda (Zairio)

Ulrich Matthias (Germanio)

Atiljo Orellana Rojas (Argentino)

Ĝŝhó-Davies Olúwábùnmí (Niĝerio)

Anna Rachoń (Pollando)

Robert Roze (Francio)

Ūatanabe Kei (Japanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy

Provlegado: Rob Moerbeek


Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facilinvaj artikoloj estas verkita en la niveloj tre *facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujara.

Anoncarifoj:

Tutpaĝa 780 gld., duonpaĝa 430 gld., kvaronpaĝa 240 gld., sesonpaĝa 185 gld., okonpaĝa 130 gld. Eksterakrovilaĵ anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonco!) en sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la koncerna anonco. La abontarifo varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.

Malfortvidantoj povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.



## enkonduko

*Dum la UK en Prago okazis kunsido de KONTAKTO-*

*legantoj, kie mi ĝojis renkonti dudekon el vi. Nova okazo por renkontiĝo sin prezentos sabaton la 9-an de novembro.*

*Tiam estos Malferma Tago en la Centra Oficejo, dum kiu eblos aĉeti librojn kun rabato, viziti nian bibliotekon,*

*kafumi, spekti E-filmojn, babilu kun la oficistoj kaj aliaj vizitantoj. Jen bona ŝanco por paroli ankaŭ pri KONTAKTO.*

*Gastos en la Malferma Tago ankaŭ Humphrey Tonkin, la unua redaktoro de KONTAKTO. Cetere, indas viziti*

*Roterdemon ankaŭ por admiri la imponan Erasmo-ponton, ĵus inaŭguritan.*

*Gratulon al KATA-LUNO, la gazeto de Kataluna Esperanto-Junularo, kiu festis sian 30-an numeron per dika eldono.*

*Ĝis la Malferma Tago!*

*Francis*

Ĉina virino, kiu vivas en Aŭstralio pli ol dudek jarojn, antaŭnelonge rakontis al mi jenan historion. Baldaŭ post sia alveno en la landon, jam flue parolante la anglan, ŝi havis naskiĝtagon kaj aŭstralia amiko invitis ŝin por festa vespermanĝo. Kiam ŝi alvenis al la domo, oni transdonis al ŝi donacon volvitajn en bela papero. Ŝi amase dankis sian amikon kaj flankenmetis la donacon. Embarasita\* de ŝia reago, la aŭstraliano demandis: “Ĉu vi ne volas malfermi ĝin?” La ĉinino respondis: “Ho, ne, ne! Mi ne volas malfermi ĝin nun! Certe ne!” Nur longe poste ŝi konsciiĝis\*, ke ŝi estis nevole farinta “kulturan mispaŝon”. Dum estas ĝenerale konsiderate ordinara ĝentilaĵo en la ĉina kulturo ne malfermi donacojn tuj antaŭ la donacanto, la anglo-aŭstralia kulturo havas la malan vidpunkton.

Ofte oni diras, ke unu el la plej grandaj baroj por homoj, kiuj enmigri\* en novan landon, estas lerni la tiean lingvon. Estas vero, ke multaj aziaj enmigrintoj en Aŭstralio trovas malfacila lerni la anglan. Tamen, eĉ kiam ili parolas la lingvon bonege, ili povas ankoraŭ trovi sin farantaj sociajn fuŝojn kaŭze de sia nekono pri la malsamaj kulturaj valoroj kaj kutimoj.

## Lingvo kaj ritoj\*

Enmigrintoj povas renkonti tutan kolekton da malfacilaĵoj se ili ne konscias tiujn ĉi kulturajn diferencojn. Kiam du homoj edukitaj en la ĉina kulturo renkontiĝas surstrate, ili ofte diras: “Kien vi iras?” [ni-i ŝan na-ar ĉju ja?] aŭ “Ĉu vi jam manĝis?” [ni-i ĉ' fan la ma?]. Tiaj salutoj povas esti rigardataj de homoj el anglalingva deveno kiel malkonvenaj, agacaj\* kaj sufiĉe strangaj, ĉar respekto\* al la unuopula propeco estas vaste akceptata kulturero en plejparto de la anglalingvaj landoj.


Ordinara maniero saluti homon en Aŭstralio estas “Kiel vi fartas?” (“How are you?” [haŭ ar ju?] aŭ “How are you doing?” [haŭ ar ju duin?]). Kvankam kunmetitaj kiel demandoj montrantaj intereson pri la bonfarto de la demandato, ili fakte ne devas esti prenitaj laŭlitere. Ili estas ekzemploj de ritaj salut-esprimoj, kio estas el-stara aspekto de plejparto de la lingvoj. Ĝenerale parolantoj atendas ritan respondon kiel “Tre bone” aŭ “Ne malbone”, eĉ se la demandato fakte ne sentas sin bone.

Multaj ĉinaj enmigrintoj trovas malfacila kompreni, kial iliaj anglo-aŭstraliaj amikoj kaj samlaborejanoj atendas jesan respondon al tiaj demandoj anstataŭ veran. Kelkaj demandis min: “Se ili ne vere deziras scii, kiel mi fartas, kial ili faris al mi ĉiujn tiujn demandojn? Jen pura hipokriteco\*!” Povas pasi jaroj antaŭ ol ili malkovras, ke ili faras supozojn bazitajn sur la ĉinaj kulturaj normoj kaj kondukt\*-reguloj.

Kelkfoje anglo-aŭstraliano povas saluti iun dirante: “Saluton! Vi aspektas bele hodiaŭ!” Tie ĉi la parolanto povas ne preparoli la vestaĵon de la alparolato sed zorgoplene fari demandon kiel: “Ĉu vi bonvolus diri al mi, kiun vi renkontos / kien vi iras?”, por kio la respondanto povas esti: “Ho, mi devas viziti mian ĉefon hodiaŭ” aŭ “Ni havas feston hodiaŭ.”

En multaj aziaj kulturoj, kiam amikoj aŭ konatoj subite trafas unu la alian surstrate, ili haltas kaj interŝanĝas salutojn, kiujn sekvas mallongaj aŭ longaj interparoloj, depende de la proksimeco de ilia amikeco. Estas konsiderate malĝentila diri simple: “Saluton!” kaj plu piediri. Eĉ se unu el la du havas tujan farenadon, oni atendas, ke li aŭ ŝi haltu kaj ĝentile respondu al demandoj.

En Aŭstralio, tamen, kie homoj estas malpli formalaj\*, estas tre akceptite diri: “Mi bedaŭras, kara, mi devas rapidi” aŭ simple “Saluton!” kaj plu piediri. Ĉinaj enmigrintoj, kiuj ne komprenas la aŭstralian malstreĉecon kaj neformalemon, prenas tian konduton kiel sekan kaj malamikan.



Broome, Orienta Aŭstralio



## Manĝu! Manĝu! Manĝu!

Ĉinaj enmigrintoj ofte sentas sin sen-orientaj en sociaj okazoj. Jena teatraĵeto bone montras tion. Ĉina paro da enmigrintoj invitas siajn aŭstraliajn amikojn vespermanĝi en ilia hejmo. Kiam la aŭstraliaj gastoj alvenas, iliaj gegastigantoj fingromontras al la longa brakseĝo kaj diras: "Bonvolu, gesinjoroj Smith. Sidiĝu! Sidiĝu! Sidiĝu!" Iom konsternitaj\*, la aŭstraliaj gastoj sidiĝas sen diri vorton. Post kelkaj drinkaĵoj, la gastoj estas petataj okupi sian lokon ĉe la tablo. La gastigantino alportas manĝaĵojn al la tablo kaj la gastiganto, montrante la manĝaĵon per siaj longaj manĝiletoj, rapidigas siajn gastojn kun granda viveco, "Bonvolu, gesinjoroj Smith. Manĝu! Manĝu! Manĝu!"

Kion la enmigrintaj gegastigantoj ne sukcesis kompreni estas, ke "Sidiĝu! Sidiĝu! Sidiĝu!" kaj "Manĝu! Manĝu! Manĝu!" estas formoj, kiuj en la angla normale taŭgas nur por ordonoj direktitaj al etaj infanoj kaj hejmaj hundoj. Ĉar ili transplantis sian originalan kulturen tekston al la aŭstralia "teatro", ili atingis la malon de tio, kion ili esperis: ili igis siajn gastojn senti sin maltrankvilaj kaj malkomfortaj.

## Neniam diru ne

En multaj aziaj kulturoj, transdono de donaco sekvigas reciprokecon\* kaj komunajn devigojn. En la ĉina kulturo, ekzemple, oni atendas, ke la ricevanto de donaco reciproke per io samvalora. Konduti alie estas rompo de etiketo\*.

Tiu ĉi doni-kaj-ricevi estas grava aspekto de la ĉina kulturo. Ĝi disvolvas amikecon, kreas harmonion\* kaj plifortigas ligojn inter familianoj, amikoj kaj samlaborejanoj. Jam en la anglo-aŭstralia kulturo, donaco estas vidata kiel nura maniero diri dankon aŭ montri estimon. Ofte la ricevanto ne estas devigita siavice doni donacon. Anstataŭe, li aŭ ŝi povas proponi fari ion utilan al la donacintoj, ekzemple helpi ilin translokiĝi aŭ prizorgi iliajn hejmbestojn dum ili ferias. Pro tiuj ĉi malsimilaĵoj, multaj ĉinaj enmigrintoj sentas sin vunditaj\*, kiam iliaj anglo-aŭstraliaj samlaborejanoj aŭ amikoj akceptas donacojn per nura: "Dankon!"

Ankaŭ malakcepti kaj akcepti invitojn kaŭzas problemojn. En la ĉina kulturo, la homoj ĝenerale restas ĉe la principo de reciprokeco, kiam ili ricevas inviton vespermanĝi. Alivorte, oni atendas, ke ili redonu la gastigon baldaŭ poste. Normale, la invititoj klopodas iri al la vespermanĝo, sed se ili havas alian fendaĵon aŭ ne ŝatas la gastiganton, ili malakceptas la inviton per preteksto\*. La pretekstoj estas ofte "senkulpaj mensog\*etoj", sed la gastoj akceptas ilin ĉar li aŭ ŝi komprenas, ke tio estas maniero malakcepti en diplomata\*, nereкта kaj, plej grave, kulture akceptita maniero.

Tio ĉi estas verŝajne la kampo en kiu multaj ĉinaj enmigrintoj en Aŭstralio spertas la plej grandan "kulturan ŝokon\*". Grava konsistero de la ĉina kulturo estas "savi sian vizaĝon" (ge-i mjen z'), kio tradukeblas kiel savi sian honoron\* aŭ mem-amon, respektante la mem-amon de aliaj, ne vundante ies sentojn aŭ embarasante alian homon. Malakceptante inviton, homoj de la ĉina kulturo faras sian plejblon por "savi la vizaĝon" de la alia per ne-uzo de la vorto "ne", kiu estas konsiderata ofenda\*.

Tial, kelkaj ĉinaj enmigrintoj sentas sin profunde ofenditaj de aŭstralianoj, kiuj malakceptas inviton en rekta maniero: "Pardonu kara, sed mi ne povas veni ĉi-vespere. Mi devas refunkciigi mian herbotondilon." Tia respondo estas ofte vidata de ĉinaj enmigrintoj kiel malplaĉa aŭ plene malĝentila. La miskomprenojn tie ĉi ne vere kaŭzas la vortoj sed la facilmaniero de anglo-aŭstralianoj, kiu konsiderinde diferencas de la pli granda formaleco de ĉinoj.

Lingvo spegulas kulturon. Estas grave por enmigrintoj lerni kompreni la novan kulturon ĝuste same kiel regi la novan lingvon. Nuntempe la rimedoj de lingvoinstruado por enmigrintoj emas esti tro mallarĝe prenataj. Nur se oni plene komprenas la vivan interrilaton inter lingvo kaj kulturo oni povas ĝuste lerni kaj trafe uzi la lingvon. □

Jia Tian, Aŭstralio

(Esperantigita el THE UNESCO COURIER februaro 1994)

# Pri donacoj kaj agacoj

facila

Por ĉinoj enmigrintaj en Aŭstralion superi kulturajn diferencojn povas esti tiel malfacile kiel lerni novan lingvon.

La gastoj, sciante malmulton pri la ĉina kulturo, ŝajnas malkomfortetaj. La gastigantoj, aliflanke, ripetas: "Bonvolu! Ne nur sidu tie! Manĝu! Manĝu! Manĝu!" Nun la aŭstraliaj gastoj aspektas eĉ pli malkomforte, pensante por si mem, ke la manieroj de iliaj gastigantoj estas sufiĉe strangaj. Intertempe, la gastigantoj estas pli kaj pli konsternitaj de la sin-retenemo de siaj gastoj. Ili ne venas al la ideo, ke ili faris "kulturan mispaŝon".

Dum en Aŭstralio gastigantoj ofte montras sian gastamon uzante esprimojn kiel "Ĉu vi dezirus sidiĝi?" aŭ "Bonvolu senti vin hejme", ĉinaj gastigantoj diras: "Zuo! Zuo! Zuo!" kaj "Ĉ! Ĉ! Ĉ!" kiuj laŭlitere signifas: "Sidiĝu! Sidiĝu! Sidiĝu!" kaj "Manĝu! Manĝu! Manĝu!" La ripetado de la vortoj "sidiĝu" kaj "manĝu" estas provo krei neformalan, gastaman akcepton.

**agaco:** koleriga piko  
**embarasi:** meti en ĝenan aŭ malfacilan situacion, el kiu oni ne povas facile eliri  
**diplomata:** kapabla lerte trakti malfacilajn aferojn  
**en-migri:** veni en fremdan landon por vivi tie  
**etiketo:** reguloj de sociaj manieroj

**formala:** laŭkutima, laŭregula, lauleĝa  
**harmonio:** plaĉa rilato inter la sentoj de pluraj personoj  
**hipokriteco:** aĉa ŝajnigo  
**honoro:** altestimo, granda respekto, kiun oni ricevas  
**konduto:** ag-maniero en la rilatoj kun aliaj homoj

**konscii:** bone scii. kio okazas  
**konsterni:** subite mirigi kaj timigi iun, farante lin nekapabla agi aŭ paroli  
**mensogo:** malvero  
**ofenda:** koleriga aŭ malplezura ĉe alies mem-amon  
**preteksto:** ŝajna kialo, kiun oni diras por kaŝi la veran

**reciprokeco:** ago, sento aŭ efiko de unu kontraŭ dua ĝuste tiel, kiel de la dua kontraŭ la unua  
**respekto:** estimoj kaj konsidero por io aŭ iu  
**rito:** aro da tradiciaj kondukmanieroj  
**ŝoko:** subita, neatendita frapo  
**vundi:** tranĉi aŭ frapi ies korpon



# OLIMPIAJ L

**LA SPORTA MONDO ĴUS TRAVIVIS NOVAN KVARJARAN FESTEĜON: LA OLIMPIKOJ. LA 19-AN DE JULIO LA TUTA MONDO SEKVIS LA INAŬURON DE LA 26-AJ SOMERAJ OLIMPIAJ LUDOJ – ĈI-FOJE EN LA USONA URBO ATLANTO, CENT JAROJN POST LA UNUAJ MODERNAJ OLIMPIKOJ EN ATENO.**

**L**a inaŭguro de la olimpiaj ludoj estas granda festo kaj spektaklo en kiu la gastiganto en ĉiam pli impona maniero klopodas prezenti sian kulturon per teatro, danco, muziko: Sed plej gravas en la inaŭguro la kulturo kaj tradicio de la olimpiaj ludoj – tradicio plenplena de simboloj.

## **KVIN RINGOJ**

Kvin ringoj estas la plej fame konata simbolo de la olimpikoj. La kvin ringoj – po unu blua, nigra, ruĝa, flava kaj verda sur blanka fono, interplektitaj unu kun la alia, reprezentas la kvin kontinentojn, kiujn kunligas du semajnoj da amikeca sportado.

La olimpiaj ludoj vere amasigas atletojn de ĉiu angulo de la mondo, sendistinge de etno, religio aŭ politika ideologio. La ludojn en Atlanto partoprenis pli ol 10 000 sportistoj el 193 landoj. Ili ludis en 271 konkursoj de 27 diversaj sportoj. Proksimume triono el la atletoj estis virinoj.

Post la hiso de la olimpika flago en la inaŭgura ceremonio komenciĝas la procesio de ĉiuj 10000 sportistoj. Laŭlande ili venas en la stadionon: unua Grekio kaj lasta la gastiganto, kaj inter ili ĉiuj aliaj landoj en alfabeto ordo. Iom post iom la stadion pleniĝas de kuristoj, saltistoj, ĵetistoj, dancistoj, pafistoj, velistoj, biciklistoj: Ĉiuj kolorplene vestitaj en la kostumo de sia teamo. Du semajnoj ili loĝos kune en la olimpika vilaĝo.

Nur tre eta parto de la partoprenantaro revas pri medaloj kaj heroaj venkoj. Por la plej granda parto pli gravas partopreni ol venki, ĉar la partopreno en la olimpiaj ludoj estas en si mem venko. Jen regas la vera spirito de la sporto sub la olimpika devizo: *fortius, altius, citius* (pli forte, pli alte, pli rapide). La ideo malantaŭ la olimpiaj ludoj, kiel ni konas ilin hodiaŭ, ne konsistas en cinika batalo pri oraj, arĝentaj kaj bronzaĵ medaloj, sed en amika kunesto kadre de fizika ekzercado.

## **OLIMPIA FAJRO EL GREKIO**

Post la atletoj alvenos en la stadionon la olimpika fajro, kiu brulos dum la daŭro de la ludoj. Sed ne temas pri ajna fajro...

La olimpika fajro ĉiam ekbrulas en Olimpio, Grekio, kie okazis la antikvaj olimpiaj ludoj antaŭ 2700 jaroj.

En la antikva Grekio pluraj urboj havis siajn "ludojn" – religiajn festojn honore al dioj. En tiuj ĉi festoj oni laŭdis la diojn en multaj manieroj: per procesioj, oferoj, manĝoj, artaj konkursoj kaj sporto.

*Ĉi-fone: Antikva bronza disko kun gravuraĵo de lancojetisto. (Muzeo Staatliche, Germanio)*

**1964** *Yoshinori Sakai, studento el Hiroŝimo, portas la olimpikan torĉon por la ludoj en Tokio.*

**1936** *Olimpia jurado en la ludoj de Berlino.*

**1896** *Starto de la 100-metra kurado en la 1-aj Olimpiaj Ludoj en Ateno. Usonano Thomas Burke (dua de maldekstre) venkis per 12 sekundoj.*

**1920** *Suzanne Lenglen el Francio (maldekstre) gajnis oran medalon per parluda teniso en Antverpeno.*

**1889** *La 26-jara Pierre de Coubertin, iniciatinto de la modernaj olimpiaj ludoj, en sportĉemizo.*



1889

1920




Ial la ludoj en la urbo Olimpio sur la duoninsulo Peloponezo ekhavis elstaran rolon. Olimpio estis sankta urbo dediĉita al la grava dio Zeŭso kaj tial – kaj nur tial – naskiĝis la olimpikoj.

La unuaj olimpiaj ludoj pri kiuj ni scias okazis en la jaro 776 a.K., kiam Koroibos el la urbo Elis venkis en la stadiona kuro. Kaj poste ili ripetigis ĉiun kvaran jaron almenaŭ ĝis 217 p.K. Verŝajne ili tamen ekzistis ĝis 393 p.K., kiam la romia imperiestro Teodozio la 1-a malpermesis la ludojn ĉar ili estis paganaj. Pro la kvarjara intervalo inter la olimpiaj ludoj, la vorto "olimpiado" eniris la grekan lingvon kun la signifo "kvarjara periodo".




# LUDOJ



1936

KJELL HEGGVOLD ULLESTAD, NORVEGIO

1896




1964



La olimpika flago

## sparta



Pasejo, kiu ligis la stadionon kun la templo. Konstruita en la helenisma periodo, ĝi estis la oficiala eniro de atletoj al la stadiono. Sube, bildo el la templo de Zeûso en Olimpio.

sporta programo pligrandiĝis kaj pligraviĝis. Kaj la sportistoj, kiuj de la komenco nepre devis esti amatoroj, pli kaj pli fariĝis profesiuloj en la praktiko. En siaj hejmurboj la venkintoj ricevis grandajn donacojn kaj heroan statuson aldone al la jam grandaj premioj en la ludoj.

La antikvaj ludoj estis ekskluzive por viroj. Estis nepre postulo, ke la partoprenantoj estu liberaj grekaj viroj. Virinoj ne rajtis ĉeesti eĉ kiel spektantoj; escepto estis nur la pastrino de Demeter. La konkursantoj krome estis ĉiam nudaj.

En la ludoj de 776 a.K. ŝajne estis nur unu konkurso: la stadiona kuro (=192 metroj). Poste aldoniĝis ankaŭ pli longaj kuroj, ĉevalkuroj, luktado, pentatlono (kombino de kvin sporto-specoj), pug-noluktado kaj kelkaj aliaj disciplinoj. Sed ĝenerale la programo de la antikvaj ludoj estis multe malpli ŝanĝigema ol tiu de la modernaj.


En la dua jarcento a.K. la romianoj okupaciis Grekion kaj la falo de la olimpiaj ludoj komenciĝis. Por la romianoj nur la ideo nudvesti sin kaj publike konkursi estis maldeca. Ili tamen komprenis la valoron de la festoj, kaj aranĝis mem atletikajn konkursojn en siaj cirkoj, en kiuj povis ĉeesti ĝis 250 000 spektantoj. Sed malgraŭ tio, kiel jam menciite, imperiestro Teodozio la 1-a en 393 p.K. per malpermeso metis definitivajn finojn al la antikvaj ludoj.

### RELIGIO KAJ SPORTO

Ĉar la ludoj okazis honore al Zeûso, la religiaj ceremonioj okupis grandan parton de la programo en la unuaj 300 jaroj. La sportaj konkursoj okazis nur en la dua tago, post tago de preĝoj kaj oferoj. Plej grava estis la ofero de cent bovoj en la tria el la kvin tagoj, kiujn daŭris la ludoj.

Ankaŭ la sportaj konkursoj forte rilatis al religio. Ekzemple torĉostafetoj — la origino de la olimpia fajro — finiĝis ĉe altaro, sur kiun la venkintoj rajtis meti sian torĉon honore al la dioj.

Tra la miljara periodo de la antikvaj olimpikoj okazis kompreneble pluraj ŝanĝoj. Iom post iom la



### OLIMPIAJ LUDOJ REVIVIĜAS

En 1887 Pierre de Coubertin [pjer de kuberten'], 24-lara franca barono, ekhavis la ideon revivigi la antikvajn olimpiajn ludojn. Kaj naŭ jarojn poste la unuaj modernaj ludoj inaŭguriĝis en Ateno, la ĉefurbo de Grekio.







La celo de Coubertin estis instigi la junulojn al fizika ekzercado kaj krei en ili moralajn ecojn kiel justeco kaj helpemo — li ekzemple parolis pri la kavalira spirito de sporto. La modernaj olimpiaj ludoj do naskiĝis ne kiel distro por homoj nek kiel brila komerca ideo, sed kiel lernejo por la junularo.

En la unuaj ludoj en Ateno partoprenis 295 viroj — neniu virino — el 13 landoj en 42 konkursoj. Jam kvar jarojn poste la statistiko montris 1077 partoprenantojn — el kiuj 12 virinojn el 21 landoj. Kaj la konkursoj jam estis 97!

La ĉi-jaraj olimpikoj en Atlanto estas la 26-aj. Oni kalkulas ĉiujn ludojn, ankaŭ tiujn, kiuj ne okazis pro milito (1916, 1940 kaj 1944). Nur la ludoj de Ateno en 1906 ne enkalkuliĝas, ĉar ili ne kongruas kun la kvarjara ciklo — la olimpiado, sur kiu baziĝas la nombrado.



1968



1996



1952



### La olimpika ĵuro

La olimpikan ĵuron prezentas dum la inaŭguro de la ludoj sportisto de la gastiganta lando: "Nome de ĉiuj partoprenantoj, mi promesas, ke mi partoprenos en tiuj ĉi olimpiaj ludoj konsiderante kaj obeante ĝiajn validajn regulojn, en la bona spirito de, kaj por la reputacio de la sporto kaj por la honoro de nia teamoj."

Por arbitraciantoj estas aparta ĵuro.

En 1924 okazis en la franca urbo Chamoniz [ŝamoni] la unuaj vintraj olimpiaj ludoj. Ilin partoprenis 294 atletoj el 16 landoj, kiuj luktis en 16 konkursoj en sportoj kiel skiado, sketado kaj glaciĥokeo. La vintraj ludoj estis konsiderinde malpli grandaj ol la someraj. La 17-ajn vintrajn ludojn en Lillehammer, Norvegio, en 1994, partoprenis ĉirkaŭ 2000 sportistoj el 61 landoj. Ekde la ludoj en Lillehammer la vintraj kaj someraj ludoj okazas alterne ĉiun duan jaron tiel ke la someraj restas en sia origina ritmo. Sekve la venontaj vintraj ludoj okazos jam post du jaroj — en Nagano, Japanio.

La historio de la olimpikoj estas plena de heroaj atletoj, kiuj amase kolektis orajn medalojn kaj rompis rekordojn. Plej fama estas verŝajne Jesse Owens [ĝesi oŭenz], usona nigrulo, kiu gajnis kvar orajn medalojn en la nazi-propagandaj olimpikaj ludoj de Berlino en 1936. Same abundas memorindaj momentoj, kiel kiam Bob Beamon [bab bimn] (Usono) saltis 8,90 metrojn en la longosalta konkurso en Meksikourbo en 1968 — rekordo, kiu restis ĝis 1991.

*Plaĝa retpilko, kiun montras tiu ĉi poŝtmarko, estas unu el la sportoj ĉi-jare enkondukitaj en la olimpikojn.*



Dum la pasintaj cent jaroj aŭ 25 olimpikoj, la ludoj travivis neimageblan evoluon. La nombro de landoj kaj partoprenantoj ade kreskis, same kiel la nombro de konkursoj. En Atlanto aldoniĝis i.a. plaĝa retpilko kaj terena biciklado. Alia grava evoluo estas la ade kreskanta proporcio de virinaj partoprenantoj. Antaŭ 100 jaroj partoprenis neniu virino en Ateno. En Atlanto ili estis ĉirkaŭ 3500.

### OLIMPIKAJ POTENCULOJ

Sed ni reiru al la inaŭguro, kiun ni lasis ĉe la alveno de la olimpika fajro. Tion sekvas alia tre solena parto de la programo: la oficiala malfermo, plej ofte fare de la ŝtatestro de la gastiganta lando, petite de la prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato (IOK).

IOK estas la oficiala organizanto de la olimpiaj ludoj. Ĝi decidas, kiu gastigu la ludojn, kia estu la programo kaj pli malpli ĉiujn aspektojn de la aranĝo.

n-ro 154 (1996.4)

6

### Paraolimpikoj

Post la Olimpikoj la flamo de la Paraolimpikoj ek lumiĝas por 10 pliaj tagoj de sporto inter atletoj kun la handicap. La 10-ajn ludojn en Atlanto (la unuaj okazis en Romo en 1960) partoprenis 4000 sportistoj el 120 landoj.

### Oraj olimpikuloj

La plej sukcesaj sportistoj en la modernaj olimpikoj estis: Ray Ewry, Usono (atletiko, 1900-08): 10 oraj - 0 arg. - 0 bronza; Larissa Latynina, Sovetunio (gimnastiko, 1954-64): 9 - 5 - 4; Paavo Nurmi, Finnlando (atletiko, 1920-28): 9 - 3 - 0

Por la vintraj ludoj la listo estas jena: Ludmila Jegorova, Ruslando (skiado, 1992-94): 6 - 3 - 0; Lidija Skoblikova, Sovetunio (sketado, 1960-64): 6 - 0 - 0; Bjørn Dæhlie, Norvegio (skiado, 1992-94): 5 - 3 - 0



Televidadaj elsendorajtoj portas grandajn enspezojn al la olimpikoj.





Simbolo de la jubilea olimpiko.



1976



1972

## La olimpikaj urboj

### Someraj Ludoj:

- 1896 Ateno
- 1900 Parizo
- 1904 Sankta-Luizo
- 1908 Londono
- 1912 Stokholmo
- 1916 Berlino
- 1920 Antverpeno
- 1924 Parizo
- 1928 Amsterdamo
- 1932 Los-Anĝeleso
- 1936 Berlino
- 1940 Tokio/Helsinko\*
- 1944 Londono\*
- 1948 Londono
- 1952 Helsinko
- 1956 Melburno (ĉevalkonkursoj en Stokholmo)

- 1960 Romo
- 1964 Tokio
- 1968 Meksikourbo
- 1972 Munkeno
- 1976 Montrealo
- 1980 Moskvo
- 1984 Los-Anĝeleso
- 1988 Seulo
- 1992 Barcelono
- 1996 Atlanto

### Vintraj ludoj:

- 1924 Ĉamonix
- 1928 St. Moritz
- 1932 Lake Placid
- 1936 Garmisch-Partenkirchen
- 1940 Garmisch-Partenkirchen\*
- 1944 Cortina d'Ampezzo\*
- 1948 St. Moritz
- 1952 Oslo
- 1956 Cortina d'Ampezzo
- 1960 Squaw Valley
- 1964 Innsbruck
- 1968 Grenoble
- 1972 Sapporo
- 1976 Innsbruck
- 1980 Lake Placid
- 1984 Sarajevo
- 1988 Calgary
- 1992 Albertville
- 1994 Lillehammer

\* Ne okazis pro milito. Okazis ne nombritaj someraj ludoj en Ateno en 1906.

**1952 Finnino Lydia Wideman en Oslo, la unua olimpika ski-ĉampionino**  
**1956 Alĝeria franco Alain Mimoun, arĝento en 1948 kaj oro en Melburno**  
**1968 Bob Beamon longsalte mondrekordas (8,90m) en Meksiko**

**1996 Nordkoreo kaj armeo luktas en Atlanto dum la nokton regas Coca Cola**  
**1976 Rumanino Nadia Команeci en Montrealo, la unua 10-poenta gimnastikistino**  
**1980 Moskva urseto Miŝa**  
**1972 Teroristo en Munkeno**



Pro tio la membroj de IOK, kaj precipe ties prezidanto — nuntempe la hispano Juan Antonio Samaranch [ĵuan' antonjo samaranĉ'], havas grandan potencon en la sporta mondo.

Sed la olimpikoj ne temas nur pri sporto, sed ankaŭ pri mono — granda mono. La du ĉefaj enspezoj venas pro anoncoj kaj vendo de la rajtoj je televida elsendo. Nur tiuj rajtoj alportas por ĉiu olimpika ludo po miliardoj da dolaroj. La regularo pri anoncado en la olimpikoj estas tre strikta. Ekzemple, anoncoj ĉirkaŭ la stadiono estas malpermesitaj. La striktaj reguloj rilatas i.a. al la origina principo, ke la ludoj estu por amatoroj; principo, kiun oni pli kaj pli flankenmetas, ekzemple en futbalo, teniso kaj biciklado.

La reguloj pri anoncado diras ankaŭ, ke povas esti por ĉiu tipo de produkto nur po unu anoncanto, kiun elektas IOK. Sekve la potencaj multnaciaj entreprenoj akre konkuras por havigi al si lokon ĉe la plej grava sporta aranĝo de la mondo.

IOK ankaŭ decidas, kiu rajtas partopreni la olimpian ludon. Fakte, la sola formala postulo estas, ke la atleto venu el lando, kie estas nacia olimpika komitato aliĝinta al IOK. Sed en eksterordinaraj kazoj oni faras esceptojn. Tiel, en 1992, la sportistoj de Jugoslavio, kie ne funkciis la nacia komitato, tamen partoprenis la ludon.

Sed ĉar la olimpikoj iom post iom atingis enormajn proporciojn, oni nun provas iom bremsi la kreskon. Ekzemple, ĉiu lando rajtas havi nur po tri (antaŭe estis kvar) partoprenantoj en ĉiu konkurso. En pluraj sportoj oni ankaŭ metis kvalifikajn postulojn al la atletoj, kio eble kontribuas al pli forta orientiĝo ĉirkaŭ la konkursa elemento de la ludo.

La komitato tamen estas ofte ankaŭ kritikata esti ne demokratia kaj tro maljuneca. Sed oni nun provas fari ŝanĝojn elektinte novajn membrojn pli junajn kaj reformemajn.

Malgraŭ la kritikoj oni jam plurfoje proponis IOK-n por la Nobelpremio pri Paco kiel organizanton de la plej granda sporta manifestacio en la tuta mondo... Tio portas nin al alia aspekto de la olimpiaj ludoj: la politika.

## BLANKAJ KOLOMBOJ

La inaŭgura ceremonio ĉiam finiĝas per liberigo de blankaj packolomboj. Tio simbolas ankaŭ la regulon de la antikvaj olimpikoj, ke regu paco dum la ludoj. Estas interese, ke la antikvaj grekoj aranĝis siajn ludon ankaŭ se estis milito, dum la modernaj ludoj devis paŭzi trifoje pro tiu kialo.

Kvankam la olimpiaj ludoj estas en si mem politike neŭtralaj, ankaŭ ili influigas de la ĉirkaŭa mondo. Plej tragike tio evidentiĝis en la 20-aj someraj ludoj en Munkeno, Germanio, en 1972.


Palestinaj teroristoj tiam atakis la olimpikan vilaĝon. Ili mortigis du kaj kaptis naŭ israelajn sportistojn, postulante la liberigon de 200 palestinaj kaptitoj en Israelo. La polico poste klopodis liberigi la israelajn atletojn, sed malsukcesis. La naŭ kaptitoj, kvin teroristoj kaj unu policisto mortis dum batalo en la flughaveno de Munkeno.

En la 70-aj kaj 80-aj jaroj la olimpiaj ludoj ofte spertis ankaŭ bojkotojn. Unue en 1976 22 afrikaj ŝtatoj bojkotis la ludon en Montrealo, Kanado, pro la partopreno de Nov-Zelando, kiu estis ludinta rugbeon kontraŭ Sud-Afriko, ekskludita pro la apartismo-reĝimo. Kvar jarojn poste, Usono kaj 50 aliaj ŝtatoj bojkotis la ludon en Moskvo pro la interveno de Sovet-Unio en Afganistano. Responde al tiu bojkoto Sovet-Unio kaj aliaj socialismaj landoj forestis dum la ludoj en Los-Anĝeleso, Usono, en 1984. Ankaŭ en Seulo en 1988 mankis kelkaj landoj, kiuj havis malbonajn rilatojn kun Suda Koreio.

La ĉi-jarajn ludon ĉeestis sportistoj de ĉiuj 193 membroŝtatoj de IOK. Senmakule tamen ne okazis la jubileaj ludoj: eksplodis bombo en la olimpika parko dum koncerto, kaj mortis du homoj. Kiam mi skribas tion ĉi, oni ne scias, kiu estas la kulpulo kaj kio estis lia motivo. Tamen 4-an de aŭgusto ĉiuj 10 000 partoprenantoj forlasis la stadionon post la ferma ceremonio — nun ne dividitaj laŭ landoj, sed ĉiuj kune en granda miksaĵo riĉa, gaja kaj bunta.

Ĉar tia estas la olimpia tradicio, kaj tia estas la olimpia spirito. □






# La ĵetbuloj

— Atiljo Orellana Rojas, Argentino

Ĵetbuloj estas ĉasilo tipa de la pampasa regiono en Argentino. Elpensita de la aŭtoktonaj popoloj teuelĉa, mapuĉa kaj patagona, la iamaj loĝantoj de Patagonio, la armilo konsistas el 3 sferoj ligitaj per ledaj plektaĵoj. La gaŭĉoj poste adoptis ĉi tiun ĉasilon kaj en ties uzado fariĝis tiom spertaj kiom la indianoj. Ĵetbuloj tiom populariĝis en postaj periodoj, ke neniu kamparano forlasis sian domon sen porti ilin pendantaj de la zono.

*Pampasaj indianoj kaptas ĉevalojn per ĵetbuloj.*



En la jaro 1845 Francisco Javier Muñiz (fransisko ĥavier' munjis') priskribis ilin kiel "formitajn de 3 buloj grandaj kiel pugno, kovritaj per ledopecoj kaj kunligitaj per 1-metraĵ ledŝnuroj. Por uzi ilin oni prenas en la mano la plej malgrandan sferon (nomata stirilo) kaj ĉirkaŭsvingas ĝin super la kapo tiel, ke la du aliaj pro la ĉirkaŭirado akiras grandan rapidecon kaj oni povas tiam ĵeti la tuton en la direkto de la kruroj de la ĉevaloj aŭ bovinoj". Per tiu ĉi metodo la brutoj estis kaptitaj, ĉar iliaj piedoj restis firme ligitaj per la ŝnuroj ledaj.

La buloj estis origine el ŝtono, sed kie tiu materialo ne ekzistis, ĝi estis anstataŭigita per femuraj ekstremaĵoj bovinaj ĉirkaŭvolvigitaj per humida ledo.


Hodiaŭ ĵetbuloj estas malmulte uzataj, sed la plejmulto estas destinita al dekoracio. Seriozaj kolektantoj amasiĝas en la famaj foiroj de kvartalo San Telmo en Bonaero, la argentina ĉefurbo, por aĉeti la plej luksajn kun ornamaĵoj el arĝento. □

Sabina, la fama fakulo pri interlingvistiko, ĵus finis prelegvojaĝon tra la lokaj kluboj de

# Prelegvo

Anna Lö

pluraj apenaŭ konataj urbetoj en Okcidenta Eŭropo. La klubanoj ĉiam afable bonvenigis ŝin, sed bedaŭrinde ne ĉiuj sukcesis gastigi ŝin en komforta ejo. Ĉu vi povas malkovri per la helpo de la apudaj indikoj je kiu dato ŝi vizitis kiun urbeton, pri kio ŝi prelegis, kaj en kiu loko ŝi dormis? Sendu vian rezulton al nia redakcio antaŭ la 30-a de novembro 1996. Inter la solvintoj ni lotumos la faman libron *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins.



La danĝera lingvo  
Propedeŭtika valoro  
Socilingvistikaj aspektoj  
Interlingua en perspektivo  
Etimologia iĥtiologia studo

28-a de junio

5-a de julio

18-a de julio

2-a de aŭgusto

10-a de aŭgusto

Subtegmentejo

Tendo


Hotelo

Gastoĉambro

Sofo

PRELEGO	URBETO	DORMOLOKO





## Helpindikoj

1. La tria prelego okazis en la ĉarma vilaĝo Pordobruna.
2. Tuj post sia prelego pri "Propedeŭtika valoro de Volapuko", Sabina plu vojaĝis al Ratadomo, kie ŝi dormis en senorda subtegmentejo.
3. Malgraŭ entuziasma aplaŭdo post ŝia prelego "Socilingvistikaj aspektoj de la Idomovado", Sabina tiunokte devis dormi sub lika tendo en la ĝardeno de la kluba sekretario.
4. Sabina estis plej bonŝanca la 2-an de aŭgusto; tiam oni pagis ŝian restadon en luksa hotelo.
5. Ne en aŭgusto la prezidanto de la klubo de Grasaluno plendis, ke li ne sukcesis aperigi sur la afiŝo la plenan titolon de la prelego "Etimologia, filologia, lingvistika kaj kulturhistoria studo de la internaciaj iŝtiologiaj terminoj Botargo, Kaviaro kaj samspecaĵoj".
6. La 5-a de julio ne estis la nokto, kiam Sabina dormis sur sofo en la salono de la loka kasisto.
7. La titolo de la unua prelego estis "La danĝera lingvo: la angla"; ĝi ne estis prezentita en Brulaŝtono.

### URBETO

- La ŝuofundo
- Brulaŝtono
- Ratadomo
- Grasaluno
- Pordobruna


### DORMOLOKO

- Subtegmentejo
- Tendo
- Hotelo
- Gastocambro
- Sofo

### DATO

- 28-a de junio
- 5-a de julio
- 18-a de julio
- 2-a de aŭgusto
- 10-a de aŭgusto

				X														
				X														
X	X	X	X	✓														
				X														
				X														



**Noto:** Kvankam la helpindikoj ŝajnas malmultaj, ili donas ĉiujn necesajn informojn per kiuj vi povos atingi la solan eblan ĝustan solvon. Faru jene: tralegu la helpindikojn kaj enskribu en la tabelon ĉiujn certajn informojn, uzante **X** por definitiva "ne", kaj **✓** por definitiva "jes". La unua helpindiko estas jam notita en la tabelo por montri, kiel fari. Fininte tion, vi eble imagos, ke ne eblas antaŭeniri. Sed ne senesperigu: relegu kaj komparu la helpindikojn tre atente, kaj vi konstatos, ke ekzistas malpli evidentaj kaŝitaj informoj. Ekzemple, se la tria prelego okazis en Pordobruna, evidente tie ne okazis ankaŭ tiu prelego, kiun Sabina prezentis en alia tago. Ne necesas diveni aŭ fari senbazajn antaŭsupozojn: la problemon vi povos solvi uzante puran logikon, konstruante ĉiun paŝon sur la antaŭaj.

# anonetabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

**33-jara komencanto** deziras korespondi. Jadir Boges Teixeira, Caixa Postal 71027, BR-03410-990 São Paulo - SP, Brazilo.

**Se vi havas truan** en via **KONTAKTO**-kolekto ankoraŭ restas (de pluraj n-roj nur unu!) ekzemplo(j) de n-roj 25, 28, 33, 35, 38-42, 45, 47-51/52, 53-54, 56-68: 1,50 gld.; 70-82, 84-87, 89-92, 94-109, 111-112, 114-119, 121-125/126: 1,00 gld.; 129-150: 4,00 gld. **Duoblaj n-roj: 50% pli. Rabato ekde 10 ekz.: 10%; ekde 20 ekz.: 30%. Aldoniĝas 10% por sendo kaj 6% por imposto en landoj de EU. Mendu ĉe UEA.**


**48-jara fervojisto** deziras korespondi kun la tuta mondo, ĉefe pri muziko, filmoj kaj fervojaj aferoj. Skribu al: Stefan Pyszka, ul. Słowackiego 24A/22, PL-62-300 Varsovio, Pollando.

**Ni organizos E-ekspozicion** ĉefe por gelernejoj dum la lasta semajno de novembro en la plej vizitata publika biblioteko de Belém, ĉefurbo de la amazonia ŝtato Parao. Bv. sendi salukartojn, Esperantajn filatelaĵojn, bultenojn, gazetojn, librojn kaj turismajn faldfoliojn afrankitajn per belaj poŝtmarkoj al: Klubo Esperantista Zamenhof, ĉe "Lar de Maria", Praça Floriano Peixoto 33 (São Braz), BR-66090-290 Belém - PA, Brazilo.

## kontaktisto

### Ọ̀ṣhọ́-Davies Olúwáḅ̀nmi

diplomiĝis pri sociologio en 1993, junulservis dum 1994 kaj debutis kiel verkisto en **KONTAKTO** en 1995. Ọ̀ṣhọ́ ade strebas al plibonigo de sia lingvo-scio ĝis la tago, en kiu oni ne plu devos redakti liajn tekstojn.



Tiu ĉi entreprenema niĝeriano certe estas la **kontaktisto** kun plej larĝa repertuaro: poemoj, socio en Niĝerio, personaj travivaĵoj, popolaj fabeloj kaj moroj de la joruba kulturo. Ọ̀ṣhọ́ krome havas diversajn manuskriptojn pretajn por eldono. Lia plej granda revo? Viziti **Universalan Kongreson!**

### DATO




**H**einrich Schliemann [hajnrĥ ŝliman] naskiĝis en 1822 en germana vilaĝo. Kristnaske de 1829 lia patro donacis al li la libron *Monda historio por infanoj* de Errer. Unu el la ilustraĵoj montras la scenon en kiu Eneo kun sia filo forlasas la forbrulantan Trojon. La pentraĵeto difinis la sorton de la estonta malkovranto de la arkeologia sensacio de la 19-a jarcento.

En 1870 Schliemann atingis dezertan bordon de Malgranda Azio. Oni malfacile povis kredi, ke antaŭ multaj jarcentoj ĉi tie la vivo bolis, kreskis ĝardenoj kaj staris temploj. Schliemann intuicie sentis, ke la

## Reĝa dormo

A. Hakimnejad, Irano

tre  
facila

**A**ntaŭ longe vivis reĝo\*, kiu havis serviston por zorgi pri lia lito\* kaj dormo. Ĉiunokte la servisto devis pretigi ĉion por la bona dormado de la reĝo. La servisto ricevis bonan pagon kaj la reĝo ĉiam dormis kontenta.

Sed la morto forprenis tiun serviston, kaj venis alia por zorgi pri tiu laboro.

Noktiĝis kaj la nova servisto ekmetis kusenojn\* sub la kapon\*, piedojn kaj manojn de la reĝo. Tiam li ekrimarkis pri la barbo\* de la reĝo. Flate\* li demandis: "Mia alt-moŝta\* reĝo, kien vi dezirus vian barbon: Ĉu sur aŭ sub la litkovrilon?" La reĝo ne memcerte respondis: "Mi neniam antaŭe pensis pri tio; faru vian laboron laŭ plejbono". La flatema servisto metis la barbon de la reĝo sur la kovrilon. Sed post momento la reĝo diris: "Metu mian barbon suben, ĉar la kovrilo havas kontakton kun mia kolo\* kaj mi ne povas plaĉe dormi". Sed post nelonge la reĝo ordonis\*: "Metu ĝin sur la kovrilon, ĉar mi sentas varmon". Poste li denove diris: "Antaŭe tamen estis pli bone". Kaj poste: "Tiel ĉi mi eĉ ne sukcesas spiri\*. Iom poste li kolere\* ordonis: "Faru..."

... Sed la malfeliĉa reĝo neniel povis eĉ dormeti ĝis la tagiĝo. Fine li venigis sian ekzekut\*-iston kaj ordonis al li: "Ekzekutu tiun ĉi flatulaĉon, kiu faris demandon, kiu ne lasis min dormi".

**barbo:** aro da viraj kreskaĵoj ĉe la antaŭo de la kapo kaj ĉe la kolo

**ekzekuti:** mortigi malbonfarinton

**flate:** paroli al iu per belaj sed troaj vortoj por ricevi lian preferon

**kapo:** plej supra parto de ni

**kolere:** forte malkontente

**kolo:** parto inter la kapo kaj la cetero de ni

**kuseno:** sako plena de molaj aĵoj por ke oni povu sidi aŭ dormi sur ĝi

**lito:** tio, sur kio oni kuŝas por dormi

**moŝto:** (vorto por al-paroli grandan sinjoron)

**ordoni:** estre esprimi al iu sian volon, ke li obeu

**reĝo:** dumviva ŝtat-estro, ĝenerale mem reĝido

**spiri:** en-preni aeron en sin kaj el-lasi ĝin

# Trovita Trojo

— Irina Aleksejeva, Rusio

**Pasint-printempe en la Moskva Art-muzeo estis malfermita ekspozicio el la fama kolekto "Trezoroj de reĝo Priamo" de Heinrich Schliemann, sekrete gardita dum 50 jaroj.**


monteto Hissarlik estas la loko, kie lokiĝis Trojo. Verŝajne li senlime fidis je la antikva Homero, aŭtoro de *Iliado* kaj *Odiseado*, aŭ simple instinkto gvidis lin. Tagon post tago li ĵetis sin en diversajn lokojn laŭ apudborda limo, ion kalkulis kaj skizis, citis versojn el *Iliado*. Lia edzino, Sofia Engastromenos, ĉien akompanis lin.

Dum tri jaroj Schliemann senhalte vojaĝis tra la malgranda loko ĉe monteto Hissarlik. Li eĉ komencis foslaborojn, sed ili finiĝis sensukcese, kaj nur la 14-an de junio 1873 okazis tio, kion Schliemann delonge atendis. Matene, je profundo de 28 futoj aperis muro, kiun li opiniis la muro de la palaco de reĝo Priamo. Schliemann malleviĝis en la kavon kaj rimarkis etan aĵon. Li vokis sian edzinon kaj diris: "Rapide, sendu for la laboristojn kaj diru, ke la laboroj hodiaŭ finiĝis".

Ĉi tie, en sekreta loko apud fortikega muro de la antikva Trojo, Schliemann aperigis la faman "Trezoron de reĝo Priamo". La trezoro estas la plej fama arkeologia eltrovaĵo de la moderna historio. Ĉirkaŭ la eltrovaĵoj estis du diademoj konsistantaj el 2271 ringoj, 4066 korformaj platoj kaj 16 bildoj de dioj — ĉiuj aĵoj el oro. Ankaŭ tie estis 24 oraj kolieroj,

orelringoj. Entute li trovis 8700 oraĵojn kaj

Heinrich Schliemann



krome orajn kalikegon kaj vazojn kaj etajn arĝentaĵojn. En la sama vespero Schliemann proponis al sia edzino surmeti la orelringojn, kolieron kaj diademon, kaj fotis ŝin.

La Trojo de Homero

Sofia pozas kun la juveloj.



Alain Fournier

## La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo. La sola verko de la aŭtoro, kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.



VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

# MALFERMA TAGO

sabaton la 9-an de novembro 1996 (10h00 - 17h00)

- ★ Senhala prezentado de Esperanto-filmoj
- ★ Aĉetante en la libroservo, vi ricevos rabaton de 10% (kaj ŝparos la sendokoston)
- ★ Senpaga loterio
- ★ Ankaŭ surprizaj ofertoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

**Speciala gasto:**  
**HUMPHREY TONKIN**

Fine, kiam oni kontrabande transigis la trezoron al Germanio, Schliemann allasis la aĵojn por ekspertizo al sciencistoj. Li diris: "Vidu, mi trovis la antikvan Trojon". Tamen la historiistoj tro konfuziĝis. Ili rimarkis, ke multaj aĵoj apartenas al diversaj epokoj. Oni povas supozi, ke Schliemann aldonis al la trezoro aĵojn el aliaj trovitaj trezoroj.

Siaflanke, Schliemann nenion priskribis: nek la lokon nek la profundon de la trovitaĵoj. Dum la fosadoj li multon detruis. Ĉiu trofeo, laŭ li, lokiĝis sur la tavolo "Troja-2" kaj apartenas al 2600-2400 jaroj antaŭ nia erao.




**La trezoro de reĝo Priamo, eltrovita je la profundo de 8,1/2m**

Tamen hodiaŭ neniu dubas, ke Heinrich Schliemann trovis en Hissarlik la legendan urbon. Li pruvis, ke kredante la homerajn tekstojn oni povas trovi ion — eĉ la antikvan Trojon. □

facila

## Du rakontoj pri koko

Reinhard Pflüger,  
Germanio



### La koko, kiu faris panon

Iam koko\* trovis kelkajn gren-erojn. Ĝi decidis ne tuj manĝi sed meti ilin en la teron kaj tiel ricevi pli. Ĝi demandis la ĉevalon: "Ĉu vi volas helpi min meti grenon en la teron?" Sed la ĉevalo tute ne emis fari tion. Same respondis la azeno, la ŝafo kaj ĉiuj aliaj, kiuj loĝis en la bestejo. Do la koko sola eklaboris. La greno kreskis, kaj post kelkaj monatoj oni povis de-tranĉi ĝin. Denove la koko petis aliajn bestojn kun-labori, sed neniu volis helpi. La koko tranĉis, muelis\* kaj faris bonan panon, kaj ĉion ĝi devis fari sola.

Sed kiam la pano estis preta, la ĉevalo venis kaj petis: "Kara koko, bonvolu doni al mi iom." La koko respondis: "Ne, mi povas bone mem manĝi la panon. Vi ne helpis min pretigi ĝin, do nun mi ne donos al vi." La aliaj bestoj same malsukcesis ricevi parton de la manĝaĵo. Tiam ili faris plendo-tabulojn; oni povis legi sur-skribojn kiel "La koko estas maljusta" kaj simile. Fine oni iris al la besto-juĝisto, kaj tiu decidis: "Koko, vi faris bonan laboron. Ni danku vin pro tion. Sed vi ne rajtas manĝi la panon sola. En nia ekonomia sistemo ĉiu ricevu, kion li bezonas. Do, vi devas disdoni la panon."

Tiel okazis. Nur poste ĉiuj miris, kial la koko neniam plu volis fari panon.

### Jen kiel agas hodiaŭaj kokoj

Iam koko trovis kelkajn grenerojn. Ĝi decidis ne tuj manĝi sed meti ilin en la teron kaj tiel ricevi pli. La ĉevalo aŭdis pri tio kaj demandis: "Ĉu mi helpu vin? Ni laboru kune kaj poste vi donos al mi iom de la pano." La koko respondis: "Ne, dankon. Mi povas bone fari tion sola". Same venis la azeno, la ŝafo kaj ĉiuj aliaj, kiuj loĝis en la bestejo, sed la koko ne akceptis. La greno kreskis, kaj post kelkaj monatoj oni povis de-tranĉi ĝin. Denove diversaj bestoj pretis kun-labori por poste ricevi parton, sed la koko diris "ne". Ĝi tranĉis, muelis kaj faris bonan panon, kaj ĉion ĝi faris sola.

Kiam la pano estis preta, la koko volis manĝi ĝin. Tiam kolektiĝis la ĉevalo, la azeno, la ŝafo kaj la aliaj bestoj kaj plendis: "Ankaŭ ni estas malsataj, donu al ni iom!" Sed la koko ne kompatis ilin: "Kial vi ne faris vian propran panon? Mi laboregis por ĝi." Kaj la koko miris, kial oni nomis ĝin maljusta.

**koko:** birda "vek-horloĝo"  
**mueli:** dis-er-igi



# Lernejaniĝo de vilaĝano

— Gbeglo Koffi, Togolando


**Lernejo ne estas afrikaĵo. Ĝi estas importita kaj venis kun la koloniintoj, kiuj serĉis afrikanojn, por ke tiuj helpu en iliaj diversaj laboroj. Ĉiam, kiam lernejo aperas en iu loko, la tieanoj hezitas lernejanigi siajn gefilojn. Ĉu vi ŝatus aŭdi pri tio?**

**M**ultaj el niaj avoj, kiuj vidis, kiel la blankuloj persekutis, eksklavis kaj ekspluatis la nigrulojn, ege malŝatis ĉion ajn venantan el Eŭropo. Tiel, kiam la ideo pri vizito al lernejo atingis la vilaĝon, kie mi naskiĝis, iuj tuj kontraŭstaris, dum aliaj ne volis montri sian aprobon. Ĉar la aprobintoj estis tamen pli multaj ol la aliaj, oni ekinstruis al infanoj, kaj pajla konstruaĵo utilis kiel klasĉambro.

Unua viro iris labori al la kampo. Tie li atendis sian filon ĝis la vesperiĝo, vane. Reveninte hejmen li demandis sian filon: "Kial vi ne venis al la kampo?" La filo respondis: "Mia onklo portis min al la lernejo". Tuj la patro impetis al la loĝejo de la onklo: "Kial vi sendis mian filon al tiu loko? Ne endanĝerigu la instruiston. Se morgaŭ mia filo ne venos kun mi al la kampo, la instruisto kaj vi scios, kiel oni dolĉigas la maron per unu sola sukerpeco."

Atinginte la pajlan konstruaĵon, li ne sukcesis regi sian koleron. Tial, ne salutinte la instruiston li ektondris al li: "Kiu permesas al vi malfermi lernejon en la vilaĝo? Ĉu mi permesis, ke mia filo lernu kun vi?" Li eniris la klasĉambro, serĉis sian filon, kiun li trovis en angulo. Li alproksimiĝis al li, metis la kruĉon da akvo sur lian skribotableton kaj diris: "Jen mi iras al la kampo. Tie mi trinkos tiun ĉi akvon. Do, mi trovu tiun ĉi kruĉon tie sur la kampo, kiam mi estos atinginta ĝin. Danĝero frapos vin, se mi ne trovos la akvon sur la kampo." Poste li turniĝis al la instruisto kaj, montrante la tranĉilegon, diris: "Atentu, se ne, mi senkapigos vin! Mi lasis la kruĉon da akvo sur la tablo de mia filo. Mi nun iras al la kampo. Mi vidu tie la akvon. Danĝero frapos vin, se la akvo ne venos al la kampo." Ĉe tiuj vortoj, li rapide eliris el la klasa ĉambro, kaj vojis al la kampo.

Dua viro permesis, ke liaj filoj vizitu lernejon, sed kontraŭstaris la lernejanigon de knabinoj. Iam lia unusola filino, kiu arde



Infanoj ĉiutage iradis al la lernejo, dum aliaj, idoj de kontraŭstarantoj de lerneja aferoj, restis hejme. La gepatroj, kiuj jam lernigis siajn gefilojn en la lernejo, draste riproĉis la aliajn. Kelkaj, eĉ sen la permeso de siaj najbaroj kaj parencoj, akompanis iliajn gefilojn al la lernejo. Rimarkinte, ke iliaj gefiloj spitas ilian decidon, tiuj gepatroj reagis diversmaniere.

La postan tagon la patro ne tuj iris al la kampo. Li unue eliris el la domo, restis ie ĝis la lernantoj jam iris al la lernejo, kaj tiam reiris hejmen. Kompreneble, li ne trovis sian filon, ĉar tiu jam iris al la lerno-loko. La patro rapidis al la loĝejo de la onklo, kiu tiam ne estis hejme. Ne volante perdi eĉ unu minuton, li prenis kruĉon da akvo kaj tranĉilegon, kiun li tre bone akriĝis. Jen do la patro kuris al la lernejo.

deziris viziti lernejon, havis jenan konversacion kun li:

— Paĉjo, ankaŭ mi ŝatus akompani miajn fratojn al la lernejo!

— Kiu instigas vin peti tion de mi? Ĉu ne via patrino?

— Ne! Sed mi jam parolis kun ŝi pri tio; ŝi ne kontraŭstaris.

— Ho, jes, via patrino! Ĝis nun ŝi ne volas ŝanĝi sian konduton. Ŝi deziras, ke ankaŭ vi estu putino, kiel ŝi. Ĉu vi scias, ke mi estas la dek-unua viro, al kiu ŝi edziniĝis? Ne, vi ne agu tiel. La instruistoj estas veraj putoj\* — tiaj homoj ne kunvivu kun knabinoj. Se estus instruistinoj, mi akceptus; sed tiu putino ne malĉastigu vin. Restu hejme!

Nu! Tia estas la etoso, kiam lernejo unuafoje atingas vilaĝon. Multaj viroj nun maljunaj bedaŭras, kion iliaj gepatroj faris. Tial kaj tiel, ĉiuj nun permesas, ke iliaj gefiloj vizitu lernejon. Sed en aliaj lokoj, tre for de la urboj, kie lernejo nur nun komencas malfermiĝi, la samaj problemoj aperadas. □

**puto:** retroderivo el *putino*

## LIBRO DE AMO

**"Leganto, se vi estas pruda  
Kaj naŭzas vin la amo nuda ..."**

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanonco de "L'Akacio", 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonĝetoj* (1931) k.a. Prezo: 21,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj. Mendu ĉe ŬEA.



# La pluŝa kato

— Cristina de' Giorgi, *Italia*

(Belartaj Konkursoj de UEA 1996, Tria Premio)

Ŝi deziris katon. De tro da tempo ŝi ne havis dombeston, jaroj, povis esti jarcentoj laŭ la urĝo de ŝia emo. Ŝia hundo mortis antaŭ ol ŝi forvojaĝis por esti studento, kaj la ĉagreno estis tiom profunda, ke ankoraŭ ŝi ne povis pensi pri nova hundo. Samkiel post la morto de edzo oni ne tuj povas pensi pri nova. Sed kato... kiom ŝi emus! Plenkreskosaĝe, ŝi tamen komprenis, ke tio ne eblas: la domo nesekura de studento, la oftaj forvojaĝoj...

Tiel komenciĝis la afero: de tempo al tempo ŝi ripetis al li kiom ŝi dezirus tiun katon kiun ŝi ne povis havi, ĝis li (ame? senpacience?) decidis donaci al ŝi tiun pluŝan kateton kiu gapis el la ludvendeja vitrino, okaze de ŝia nakiĝtago. Efektive, ne temis pri aparte trafa donaco: la ĝojo, kiu fontis el ĝi, fontis el la fakto, ke temis pri donaco lia, pri zorgo kaj penso lia, ne aparte pri ĝia esenco. La eta pluŝa besto havis la formon de kato, de eta siama kato, sed neniel ties varmon kaj risortajn movojn. La mieno, kiu strebis esti la mieno de vera kato, do ne posedis la tipe grandegajn okulojn kaj stultfeliĉan esprimon de porinfana ludilo, sed estis fakte iom morna, preskaŭ ĉagrenita aŭ eĉ iom kolera. La blujaj vitraj okuletoj estis iom strabaj, kaj sufokiĝis en la flaveta pelto; la korpeto estis kuntirita en sida pozicio; entute, la eta besto ne aspektis feliĉa pri sia alveno en la mondon. Sed estis donaco de li, kaj tio pleje gravis. La eta besto trovis sian lokon sur la apudlita tableto, flanke de la nokto-lampo; ĝi elegantostrebe enkadriĝis fone de afiŝo kiu beligis la litoĉambron; iom stulta afiŝo, verdire, plena je floretoj kaj fungetoj, pli oportuna por infano aŭ adoleskulino

ol por plenkreskula ĉambro: sed ĝi plaĉis al ŝi, kaj ĝia flaveca fono akordiĝis bele kun la nur iom pli hela flavo de la kata felo.

Tie la pluŝa kato vivis, iom preteratentite, la jarojn dum kiuj ilia amo kreskis, maturiĝis, dekadencis kaj

fine mortis. Dubinde ĉu ĝi iamaniere konsciis, kiom malprudenta iĝis ĝia pozicio de amsimbolo: kune kun eta amaso da aliaj objektoj, plue ĝi sialoke restis, konscie preteratentata, samkiel oni preteratentas timigan malsanon, samkiel oni ne apogas la fingrojn sur akra dorno.

Pliaj jaroj ankoraŭ pasis. Novaj objektoj vivigis la domon, la lampo apud la lito estis foje ŝaltita de vira mano; ŝi brosis siajn harojn per brilruĝa broso, donacita ame kaj senpretende. Ŝi amis rove kaj pli vaste, lernis pli vastan ĝojon ĉerpi el la multaj ecoj de la vivo, sed la objektoj kiuj ŝin ĉirkaŭis en la domo restis, kiel

ĉiame, spegulo de ŝia ĝojo aŭ konsolo en pli tristaj momentoj. La donacoj de tiu unua fora amo perdis sian rolon simblan, kiel arboj kiuj nudiĝas aŭtune: kelkajn ŝi uzis, senpacie kaj senpense, se uzeblaj; kelkajn ŝi forĵetis, senĉagrene: la origamiajn bestetojn (ankoraŭ pli frue li faris, ol ili iĝis paro), la sekigitajn rozojn. Kelkaj restis sialoke, se vere ĉarmaj, aŭ falis en tirkesto-forgesejon. La leterojn ŝi konservis, historicele. Nur la eta pluŝa kato konsistigis problemon. Ĝi ne estis tiom bela, ke oni ĝin konservu pro tio: la trajara polvoakumuligo ne favoris ĝian belecon, kaj nur reliefigis la mornan mienon, preskaŭ ĉagrenitan.


Forĵeti ĝin ŝi ne vere volis, sed eĉ ĝin ĵeti funde de tirkesto montriĝis neeble: temis fakte pri la okuloj, la vitraj, blujaj, strabaj okuloj, mornaj kaj iom ĉagrenitaj.

Kiam ŝi etendis la manon cele al tirkestoentombigo, ŝi ne povis ne havi la impreson, ke finfine tiu morna esprimo trovis sian sencon: kia trista sorto naskiĝi kiel amsimbolo, kaj pretervivi sian sencon, iĝi la embarasa bildo de aferoj kiujn oni memoras konfuzo, kiel se vivitaj de iu alia! Esti rigardata kiel oni rigardas filon, al kiu oni riproĉas esti la ido de intertempe malĝusta patro.

Ĝia kuntirita pozicio ŝajnis nun defenda, kiel se malaperi ĝi volus: neniel plu ĝi utilis, eĉ veran katon intertempe ŝi havis. Juna rapidmova kato, kies varmon kaj molon ŝi povis senti per la manoj kaj la lipoj; ĝojoplena fela vivo, kiu ridigis ŝin tage per siaj ludoj kaj dormis nokte apogite al ŝia ventro. Tiu kompatinda nevera pluŝa kato restis komplete orfa, je ĉiu senco, je ĉiu amo, je ĉiu memoro. Ĉagrenita ĝi ja rajtis esti, eĉ preskaŭ kolera: kiun rajton ili estis havintaj, elekti por ĝi tiun vivon, tiun rolon?

Pro tio ĝi restis, kie ĝi ĉiam estis, apud la lampo, kadre de la afiŝo: pro kompatio, pro simpatio, pro timo pri sama foja sorto. Agu al la aliaj, kiel vi ŝatus ke la aliaj agu al vi.

Eble ankoraŭ la pluŝa kato trovas iam sian propran sencon en la vivo. □








Du amikoj renkontiĝas:

- Ĉu vi scias? — demandas Alberto.
- Kion? — respondas Johano, mirigita de la demando.
- Vi nenion scias pri mia problemo.
- Kiu problemo? Tiu rilata al via disputo\* kun la estro dum la asembleo\*?
- Ĝuste tiu — respondas Alberto. Li pensis, ke temas pri afero finita.
- Sed vi ja ĵetis ĉiujn liajn erarojn ĝuste sur lian vizaĝon. Vi plene elmontris lian malbonan laboron.
- Jes — interrompas lin Alberto — Sed memoru, ke malgraŭ tiom da veraĵoj eldiritaj de mi kaj aliaj kamaradoj\*, li ankoraŭ estras.
- Kaj kion vi esperis? Lian tujan ekŝiĝon? Tio ne estas facila...



Abel

- Mi ja scias. Tial mi faris alian decidon, kiu certe efikos.
- Kian decidon? — demandis Johano, maltrankvila.
- Ĉu vi ne legis la hodiaŭan ĵurnalon? — ridetas Alberto.
- Ne.
- Bone — diras Alberto kun triumfa\* vizaĝo. — Mi publikigis artikolon pri lia malbona laboro. Nun li estas juĝota de la tuta publiko.
- Vi frenezas! — ekkrias Johano, ĝenita.
- Kial?
- Simple, ĉar ili ne legas ĵurnalojn!

**assembleo:** interkonsiliĝa aŭ leĝofaranta kunveno  
**disputo:** malpacigo

**kamarado:** laborista ĝentilec-nomo  
**triumfo:** granda sukceso

## Ankaŭ vi povas kontribui!

### Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

# jubileo

## jarcento de esperanto

Impona memorlibro kun raportoj pri la festado de la centa jaro de Esperanto tra la mondo kaj kun artikoloj, kiuj resumas la unuan jarcenton. Ĉio en ĵurnalisme vigla aranĝo kaj ilustrita per preskaŭ 200 fotoj.

Red. Mark Fettes. Rotterdam: UEA, 1988. 24cm. 162p. Prezo: 39,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

### Pri KONTAKTO

KONTAKTO estas tre alloga gazeto, gratulon al vi ĉiuj! Ĝiaj artikoloj estas diversaj kaj tre interesaj. Mi legas la gazeton de kovrilo ĝis kovrilo. KONTAKTO elmontras, ke en Esperanto oni povas esprimi, per simplaj vortoj, ĉiujn detalojn de la ĉiutaga vivo kaj eĉ priskribi sciencajn fenomenojn. Esperanto estas vere genia lingvo kaj KONTAKTO pruvas tion. Mi deziras multe da kontentaj legantoj kaj sukceson kaj feliĉon en viaj privataj kaj poresperantaj vivoj.

Pavol Petrik, Slovakio

malakordo inter la vorto "koloro" kaj la bildo. La efiko estus tute alia, se oni montrus ne nigran, sed buntan desegnaĵon.

(Estante ĉe la temo "misprezentoj kaj miskomprenoj", mi deziras aldoni, ke ankaŭ ĉe informado pri Esperanto ofte okazas eldiroj, kiuj male al la intenco, malutilas por varbado. Bonegan prezenton de tiu temo faris Marcus Sikosek per sia *Proponaro por la Esperanto-informado*, aperinta ĉe Flandra Esperanto-Ligo)

Reinhard Pflüger, Germanio

Mi ĵus ricevis miajn unuajn ekzemplerojn de KONTAKTO, kiun mi abonis dum nia lasta nacia Esperanto-kongreso.

Mi trovis ĝin bonega, utila kaj tre leginda. Mi gratulas vin pro la kvalito kaj riĉa enhavo de KONTAKTO!

Waldomiro Arenhart, Brazilo

Gratulojn pro via bonega laboro — KONTAKTO estas enviinda kaj sekvinda!

lonel Oneĵ, Usono

Mi gratulas vin pro la daŭre alta kvalito de KONTAKTO, ĝiaj tre diversaj kaj interesaj temoj kaj tekstoj en facila lingvo, kiuj multe helpas min.

José Antônio Cardoso, Brazilo

En nia urbeto ne estas Esperanto-klubo, do nia sola ligo kun la lingvo okazas per via interesa gazeto KONTAKTO.

Dank' al anonceto en KONTAKTO ni trovis bonajn korespondamikojn!

Lena Beresneva, Rusio

### Koloro

Hodiaŭ mi trovis tempon legi KONTAKTO-n 152 (1996:2), kaj mi estas ŝokita, kiom oni povas miskompreni mian legantleteron. Neniel mi volis kritiki la intencan de la bildstrio aperinta sur la dorskovrilo de n-ro 149 (1995:5), nur la prezentmanieron. Ne estas nigrujoj danĝeraj, sed tiel ili estas montrataj. Mia ĉefa kritiko estis la

### Krevo

Sven Walper bone skizas en KONTAKTO 152 (1996:2) la eksperimentan esencon de scienco, kun emfazo de la ĉiama principa necerteco de sciencaj konoj. Sed li troigas la gradon de necerteco pri la "prakrevo". Laŭ Walper, la teorio pri pligrandiĝo de la universo baziĝas preskaŭ ekskluzive sur la ruĝa apero de foraj steloj. Krome li asertas, ke tiu ruĝiĝo estas uzata kaj kiel indiko de fluga rapideco kaj kiel indiko de distanco. Se estus tiel, la tuta teoriumado estus logike cirkula. Treege gravas, ke ekzistas aliaj mezuriloj de distanco, ne bazitaj sur ruĝiĝo. Ekzemploj estas la (proksima) brilo de foraj galaksioj, la brilo de brilvariaj steloj tipo *Cepheid*, kaj la brilo de novaj supersteloj tipo 1. Oni daŭre serĉas aliajn mezurilojn por komparo.

La kunligo inter distanco kaj rapidmova ruĝiĝo estas nur unu observo klarigenda per teorio. Estas aliaj fenomenoj, kies klarigon oni serĉas. La kredindeco kaj certeco de la teorio pri prakrevo baziĝas sur la fakto, ke tiu teorio samtempe klarigas kelkajn plej diversajn observojn. Aliaj observoj, kiuj komplete kongruas kun la sama teorio, estas la nuna ondolongeco de la detale observata pra-radiado, la eksterordinara homogeneco de tiu pra-radiado, kaj la relativaj abundoj de hidrogeno kaj heliumo en la universo.





## Ĉu **KSTAKTO** plaĉas al vi?

Se jes, ne kontentiĝu legi la ekzempleron de via klubo aŭ instruisto – abonu ĝin mem! Se vi estas kursgvidanto, faru kolektivan abonon kun 20% rabato por via lernantaro (sufiĉas nur 6 ricevantoj). Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu

adreso, la rabato estas 40%! Kaj, se temas pri grandaj grupoj, ni povas interkonsenti eĉ pri pli favoraj rabatoj! Skribu al ni!

### ABONTARIFA 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 lirej	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

Walper mencias kvazaŭ faktojn iujn lastatempajn observojn, kiuj ne kongruas kun la kredo-teorio: kvantumitaj distancoj, kaj steloj ŝajne pli maljunaj ol la universo mem. Sed tiujn observojn oni ankoraŭ kontestas; ili ne nepre estas ĝustaj, nek ĝuste taksataj.

Por tiuj, kiuj legas angle, mi rekomendas novan popularsciencan libron, *The Three Big*

*Bangs* de Philip Dauber kaj Richard Muller (Addison Wesley, 1996). La “tri krevogoj” de la libro estas la kolizio kun rokego, kiu mortigis la dinosaŭrojn; la kredo de nova superstelo, kiu produktas pezajn elementojn; kaj la prakrevo de la universo.

Bruce Sherwood, Prof. de fiziko,  
Universitato Carnegie Mellon,  
Pitsburgo, Usono

## Post la Olimpiaj Ludoj mia opinio pri paco ŝanĝiĝis

Ni scias pri ambaŭ mondmilitoj, pri multegaj militoj en Eŭropo kaj la lukto por dispartigo de Afriko fare de la eŭropa kontinento. Hodiaŭ la ĵurnaloj montras, ke la militoj estas malproksimaj de ĉeso. Krome, pro politikaj kaj etnaj diferencoj multaj landoj baraktas interne.

Por ke amo kaj paco regu en la mondo ni tamen havas internaciajn kunfaraĵojn kiel la Olimpiaj Ludoj kaj aliaj sportaj aranĝoj, kiel la Futbala Mondpokalo. Ankaŭ ekzistas organizoj kiel UN kaj ties organoj. Jen kiel ĉirkaŭ 197 landoj povas ĉiukvarjare kunveni kaj kun paco kaj komprenemo konkursadi inter si. Landoj el Afriko konkursadas kun aliaj landoj el Eŭropo, Azio, Ameriko ktp. Cetere, Esperanto mem estas unu el la vojoj al mond-paco. Dum kaj post la pasintaj olimpiaj ludoj mia opinio pri mond-paco tamen ŝanĝiĝis. Mi nun scias, ke neniam ni trovos mondpacon.

La afrikaj landoj estis longe sub la rego de blankuloj kaj iliaj landoj, kiel Britujo kaj Francujo, sed ili nun estas sendependaj.

Afriko ne estas plu kontinento de mallumo kaj la mondo ne plu vidas nin kiel kanibalojn aŭ senvastajn simiojn, iliaj pensoj pri ni jam ŝanĝiĝis – sed ne ĉe brazilanoj kaj argentinanoj.

Post la futbalmatĉo inter Brazilo kaj mia lando, Niĝerio, en kiu ni venkis per 4-3, venis novaĵo, ke iuj brazilanoj bruligis nian ambasadorejon en Brazilo. La argentinanoj, kiujn ni venkis per 3-2, nomis nin simioj kaj pavianoj. Nia peko ne estis nur, ke ni venkis ilin, sed ke la venkon faris *nigruloj*. Ĉio okazis dum la Olimpiaj Ludoj, kiuj estas esprimo de monda paco. En la agadoj de Brazilo kaj Argentino estis pura rasismo. Ili vidis la venkon fare de *nigruloj* kiel humiligon. Se Brazilo estus venkita de iu azia aŭ eŭropa lando, ĉu ili estus bruligintaj ties ambasadorejon? Mi opinias, ke ne.

Brazilo estas mondĉampiono. Kial la landoj, kiujn ĝi venkis siatempe, ne bruligis ĝian ambasadorejon aŭ alie misfaris? Ĉu ni parolas pri mond-paco, kiam ne ekzistas justeco, egaleco kaj frateco, en mondo plena de rasismo?

Babatunde O. Awe, Niĝerio

sciujo

## La perfidema meduzo

Robert Roze, Francio

**Ĉiusomere la marsciencistoj atentigas nin pri la amasa alveno de meduzoj, ĉefe sur la strandojn de la Lazura Marbordo. Sed kio estas tiuj ĉi estaĵoj, malsimilaj al ĉiuj aliaj animalaj specioj, ŝajne venintaj de alia planedo?**

APERINTAJ antaŭ 700 milionoj da jaroj, la meduzoj enviciĝas inter la unuaj vivestaĵoj, kiuj aperis sur nia planedo. Oni nombras inter 3500 kaj 4000 specioj de meduzoj longaj de 2 centimetroj ĝis 3 metroj. La meduzoj loĝas en ĉiuj maroj, ĝis 300 metrojn sub la surfaco, sed eblas renkonti ilin ankaŭ en lagoj kaj riveroj. Ilia vivodaŭro varias inter kelkaj monatoj kaj unu jaro.

La korpo de meduzo estas nur sako el travidebla gelatenaĵo enhavanta 95% da akvo. La besto spiras osmoze, solvante la oksigenon de la akvo, kiu penetras ĝian korpon tra ĝia “haŭto”, pli ĝuste membrano. Ĝia digesta aparato similas al simpla poŝo, kies nura aperturo utilas kaj kiel buŝo kaj kiel anuso. Tiu “stomako” estas tegita per gastraj filamentoj sekreciantaj potencajn enzimojn, kiuj “likvigas” la predojn. La fekaĵoj eliras sub formo de etetaj buloj.

La meduzoj havas nek ostojn, nek koron, nek pulmojn, nek nervojn, nek cerbon. Ĉe la bazo de la tentakloj troviĝas sentorganoj, kiuj rolas kiel miniaturaj okuloj celante kontroli la flosodon de la meduzo en la maro. Seksaj glandoj ĉirkaŭas ĝian stomakon. La inaj glandoj fabrikas ovojn kaj la viraj spermatozojn. Ambaŭ reproduktaj ĉeloj estas ellasataj en la akvo, kie ili elturniĝas por interfekundiĝi.

La meduzoj moviĝas kunstreĉante sian ombrelon. Tiel, la akvo malantaŭe elĵetita antaŭenpuŝas la beston, kiel fuzaĵo propulsas raketon.


La meduzoj estas danĝeraj predantoj. Ili voras la krustulojn kaj mikroorganismojn, kiuj formas la zooplanktonon; ili ankaŭ frandegas alvusojn kaj fiŝojn. Dotita de nesatigebla apetito, unu meduzo senpene englutas 10 etajn haringojn hore.

Fine, la meduzoj posedas originalan kaj efikan armilon, kiu konsistas el miloj da kapsuloj entenantaj venenon. Tiun bruluman likvaĵon ili injektas per mikroharponoj. Je la pli malgranda ektuŝo la viktimo estas paralizita en kelkaj eroj de sekundo. Plej ofte tiu danĝera marbesto kaŭzas ĉe la homo brulvundojn aŭ dolorajn kramfojn muskolajn. Tamen kelkaj meduzoj, kiel la terura “marvespo”, kapablas mortigi homon, kiam ĝia veneno blokas la spiradon kaj sangocirkuladon. Estas do malkonsilinde tuŝi la tentaklojn de meduzoj engrundiĝintaj sur la sablo de la strandoj, kiuj eĉ mortaj gardas sian urtikecan povon. □



# Forto

— S. Ralf Gior Fröhlich, Svedio



Jacob Bendien (1890-1933), "Kanaio"

Estis griza urbo.  
Neniu vorto pli taŭgus por priskribi ĝin ol griza.  
Grizaj muroj enkadrigas sufoke ĝiajn stratojn. Tiuj lastaj mem estas grizaj rubandoj, kiuj serpente etendas la grizecon ĝis fore en la kamparo. Kiel radikoj ili boris vojojn tra la lando, por firme teni sin, tiel ke la urbo mem ne falu en grizan abismon.

Se oni observas la urbon, eĉ atenteme, verŝajne daŭrus longe ĝis oni rimarkus, ke en ĝi ekzistas homoj. Ankaŭ la homoj estas grizaj, kaj apenaŭ distingeblaj de la domoj.  
Cindre iliaj vizaĝoj rigardas el vantaj vestaĵoj.  
Senvivaj sed moviĝantaj.

Eble jam tro longe ekzistas homoj, tiel ke ĉiuj koloroj tiom miksiĝis, ke la diverskoloraj eretoj ne plu estas distingeblaj.  
Restas nur grizo, ĉie.  
Eĉ en la animoj, kiuj trote sekvas grizajn stratojn same kiel faras la piedoj de iliaj posedantoj.

Nuboj kaŝas la koloron de la ĉielo, sed ne gravas por la urbanoj.  
Ili ne levus la rigardon al sennuba ĉielo por ekvidi ĝin kaj glutante ĝian koloron farbi siajn animojn.

Meze de la urbo troviĝas parko.  
Senespera parko.  
Nur vana, vanta provo ornami la tristecon, kiu male

nur substrekas ĝin.  
Viro kuŝ-sidas sur benko. Por ripozi.  
Li surhavas grizan kostumon kaj grizan ĉapelon, same kiel la aliaj.  
Li dormetas, ŝovinte la ĉapelon sur la frunton ĝis la nazo por kovri la okulojn.  
Griza homo en griza senespero.

La senesperulojn baldaŭ pelos en grizajn domojn pluvo.

Ankaŭ la viro eksentas la proksimiĝantan pluvegon, vekigis kaj rektiĝetas.  
Daŭre la ĉapelo kovras la supran parton de lia vizaĝo.  
Subite li stariĝas kaj sammove formetas la ĉapelon.  
Du bluegaj okuloj malkovriĝas.  
Scivole ili ekzamenas la ĉirkaŭon. El ilia profundo fluas varmo kaj vivo; kaj ilia koloro ŝajnas sufiĉi por la tuta mondo.  
Jen kaj jen rigardoj elsaltas el la okuloj, kvazaŭ nekontroleblaj eroj de granda fajro. Ŝajnas, ke tiuj eretoj povus bruligi fajregon, kiu superondus la tutan mondon, kaj kies flamo atingus la homojn por varmigi iliajn korojn, postlasante deziron en ili.  
Deziron je vivo.

Sed tuj la viro reŝovas la ĉapelon frunten kaj forkaŝas la okulojn en ombro. Estas kvazaŭ li devus gardi valoran trezoron for de la mondo, por ke la grizaj gutoj el ekpluvanta ĉielo ne forlavu ĝin.